MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 12

DECEMBRO 2022 Kol. 451/38

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: 56-a Kongreso de ILEI; Kunveno en Svitavy; Lanĉo; Legaĵoj XI.; Prelegu por Kongresa Universitato; Ĉeĥaj fervojistoj; Saniga gimnastiko

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx



La redakcio deziras al vi agrablan adventon kaj trankvilajn kristnaskajn tagojn en bona sano, feliĉo kaj kontento.

## La 56-a Kongreso de ILEI ĉe la itala marbordo

Ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023, post tri sinsekvaj nur virtualaj Kongresoj, denove okazos ankaŭ en ĉeesta medio en la belega urbo Lignano Sabbiadoro en Italio, en la strandurbo situanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa Kongresejo, kiu permesos al ĉiuj kongresanoj loĝi, manĝi, labori, kaj ankaŭ ĝui feriadon en la sama vilaĝo. La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al la kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon, plurajn altrangajn ekipitajn sportajn spacojn ĉu kovritajn ĉu malfermajn.

La ĉefa temo de la Kongreso estas: “Instrui Esperanton en lernejoj”. La kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ ĉe profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj, ĉe universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj

ĝenerala publiko; simple ĉe ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin al la koncerna temo, ĉu profesie, ĉu ne.

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn, ktp. Vi trovos ĉiujn detalojn pri aliĝo en la kongresa retejo: "2023.kongreso.org". La plej favora aliĝperiodo finiĝas en **la 31-a de decembro**. Trovu la informojn ankaŭ ĉe https://2023.kongreso.org/alighilo.php

De Stefan MacGill - Al: Fakaj Asocioj

## Kunveno kaj inaŭguro de la nova ekspozicio en E-muzeo Svitavy

En la tagoj de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro okazis en la Esperanto muzeo en Svitavy kunveno kun multspecaj programeroj, unuavice por inaŭguri la novinstalitan ekspozicion: „Esperanto en fakaj asocioj".
Venis ĉirkaŭ 35 partoprenantoj, inter kiuj estis E-amikoj el Slovakio kaj Rumanio. La plej atendata estis la slovaka gasto Peter Baláž, kiu sciigis nin pri la nove instalita grupo por



organizado de UEA-universalaj kongresoj. La respondecon transprenis la grupo E@i, sidanta en Slovakio, kies ĉefo estas ĝuste li.
Vendrede la 21-an de oktobro, post komuna vespermanĝo, okazis en la bela, majesta salonego de la Muzeo prezento de la teatraĵo „Ludetoj kun

diablo“. Esperantlingve (tradukis M. Malovec), prezentis ĝin la studenta aktora-grupo DOMA el la gimnazio Svitavy. La spektantoj admiris perfektan esperantan prononcon kaj ankaŭ kapablon de la aktoroj ellerni la tekston en nekonata lingvo.



Post la teatraĵo – la vespero nur komenciĝis – kelkaj partoprenantoj promenis tra la urbo al iu vinrestoracio. Tie oni babilis en agrabla medio ĉe glaso da vino aŭ alia bongustaĵo.

Sabate matene okazis la ĉefa program-serio en la E-muzeo. La estrino de la E-klubo de Svitavy, Libuše Dvořáková, solene inaŭguris la novan ekspozicion. Ŝi ankaŭ tralegis salutleterojn de kelkaj eksterlandaj E-geamikoj.

Dum tosto kaj gustumado de bongustaĵoj la ĉeestantoj povis trarigardi la ekspozicion.

Sekvis prelego kun lumbildoj pri F. V. Lorenc (Libuše Dvořáková), prezento de novaj libroj de la eldonejo KAVA-PECH (P. Chrdle) kaj libroj kaj T-ĉemizoj kun E-surskribo de Peter Baláž. Li konstatis, ke ĉe unu vendita libro li vendis tri T-ĉemizojn.

Post komuna tagmanĝo sekvis prezento de la ĉi-jara internacia kongreso IFEF en Beroun (Ladislav Hakl), enhavriĉa informo pri KAEST-seminarioj, kiujn komencis organizi P. Chrdle kaj nun daŭrigas organizi P. Baláž.

Post la vespermanĝo daŭris la programo – rakontado kun lumbildoj pri ĉiujara grimpado al Poludnica (P. Baláž) kaj vizito de Madagaskaro (Mária Pilková).
La lastan tagon de la kunveno, P. Chrdle alproksimigis al la ĉeestantoj la personecon de la eminenta ĉeĥa poetino Eli Urbanová, okaze de centjariĝo de ŝia naskiĝo kaj dekjariĝo de ŝia forpaso (8.2.1922 - 20.1.2012). Li prezentis kelkajn fragmentojn de ŝia bunta verkaro kaj poste M. Pilková recitis ŝian poemon el la almanako, kies aŭtoro estas P. Chrdle kaj kiun li eldonis en la eldonejo KAVA-PECH.



Fine de la kunveno L. Dvořáková prezentis la vere riĉan agadon de la E-klubo Svitavy dum la jaroj 2020 kaj 2021.
La partoprenintoj forveturis hejmen kun bonaj impresoj. Ili travivis agrablan semajnfinon kun siaj E-geamikoj, aĉetis sufiĉe multajn librojn kaj ankaŭ T-ĉemizojn, oni spektis interesan ekspozicion, kiu spegulas nian komunan aktivecon.
Korajn dankojn al la svitavaj organizantoj pro la sukcesa kunveno! L. Chaloupková, M. Turková

## Lanĉo de nova librotraduko




La anino de AEH Jindřiška Drahotová lanĉis sian pluan tradukon el Esperanto al la ĉeĥa de la libro *Kredu min, sinjorino*,

merkrede la 23-an de novembro. Ŝi eldonis ĝin proprakoste – desplia merito!!




La italo Cezaro Rossetti skribis ĝin en la 1930-aj jaroj, sed ĝi daŭre estas interesa. Li humure parolas pri potvendistoj. La temo estas tamen neatendite aktuala, ĉu ne?!. La red.

Fotoj de Inĝ Zdeněk Kolín

## Legaĵoj XI.

Mi sciigas, ke aperis freŝa "LEGAĴOJ XI." kun aktualaj interesaĵoj. Oni povas ĝin peti libroforme kontraŭ 100 Kč, aŭ rete senpage ĉe drahotova@esperanto.cz.

Kiel kristnaska donaco ankaŭ taŭgaj por neesperantistoj. Oni povas aĉeti originale verkitajn librojn en Esperanto, tradukitajn al la ĉeĥa lingvo en modesta aspekto. Ekzemple: Bona Espero, Kredu min, sinjorino! Noveloj de Tibor Sekelj, Gudrun Pausewang, Notoj de Tereza Kapista, Idoj de imperio, Fabeloj I. kaj II., Verda koro, Andreo Cseh, Homo, kiu defiis Babelon kaj kelkajn aliajn rete. J. Drahotová

## Prelegu por la Kongresa Universitato en 2023

Kadre de la 108-a UK en Torino okazos la 76-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario amri@huji.ac.il plej laste la 31-an de januaro 2023. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kiel en Montrealo, ankaŭ en Torino la IKU-prelegoj povas esti virtualaj, nome eblos prelegi per Zoom.

La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego

kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la Scienca Kafejo. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo – tio estas facile farebla per la reta liĝilo: uk.esperanto.net/2023.

Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono – de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato.

Daŭre aĉeteblas la papera versio de la IKU-libro 2022, 158 p., 20 prelego-tekstoj kaj resumoj (inkluzive de la Scienca Kafejo kaj la 38-a Scienca Universitata Sesio okazinta en la 56-a BET en Litovio) kaj multaj ilustraĵoj. Ĝi estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA (mallonge.net/sc). En la Katalogo vi povas trovi ankaŭ kelkajn IKU-librojn de la antaŭaj jaroj. Kiel la Rektoro estis nomumita Prof. Fabrizio Pennachietti, emerita profesoro de la universitato de Torino kaj iama prezidanto de AIS. Helpos kiel vic-rektoro prof. Davide Astori.

De UEA al Fakaj Asocioj

## Ĉeĥaj fervojistoj informas pri Esperanto

Septembre okazis en la ĉeĥa urbo Plzeň Nacia tago de fervojo. Krom lokomotivoj, vagonaroj, fervoja tekniko kaj fervojoj miniaturaj estis prezentita ankaŭ nia E-agado.

Nia „Esperanta tablo“ estis plena de varbiloj, informiloj, libroj ktp. Sed por ni estis tre agrable, ke venis ankaŭ sufiĉe granda nombro de interesiĝantoj, kiuj demandis nin pri la internacia lingvo, niaj spertoj pri ĝi. Kun plezuro ni ankaŭ renkontiĝis kun esperantistoj el Plzeň, sed ankaŭ el Germanio.

Ladislav Hakl, ĈeFEA

## Saniga gimnastiko de Shen Junru de YANG SHENG

S-ro Shen Junru (1875–1963) estis fama ĉina socia aktivulo. Sube estas la de li inventita kaj praktikata saniga gimnastiko. Dank' al sia longdaŭra praktikado li sane vivis 88 jarojn. Nun tiu gimnastiko estas bonordigita kaj disvastigata de la koncerna departemento.

I, Movo de la talio. Staru rekte kun la du piedoj disigitaj en distanco de viaj ŝultroj. Tenu la du manojn ĉe la talio aŭ nature pendantaj. Turnu vin dekstren kaj maldekstren kelkajn fojojn.

II. Svingo de la piedoj. Staru rekte sur unu piedo. Nature kaj facile svingu la alian piedon antaŭen kaj malantaŭen kaj poste dekstren kaj maldekstren. Faru tion per la du piedoj alterne plurajn fojojn.

III. Parada paŝado. Post la supre diritaj movoj marŝu antaŭen per paradaj paŝoj, ĝis vi ŝvitetos.

IV. Froto de la piedoj. Sidu en lito kun la du kruroj interkrucitaj kaj unu piedo sur la alia femuro. Per via manplato frotu piedkavon kaj kalkanon plurajn fojojn ĝis varmiĝo kaj per la alia frotu tiujn de la alia piedo.

V. Froto de la lumboj kaj koksostoj. Per viaj du manplatoj frotu viajn lumbojn kaj koksostojn plurajn fojojn.

VI. Froto de la dorso kaj lumboj. Metu viajn manplatojn ambaŭflanken de la spino kaj forte puŝu viajn ok fingrojn (escepte de la du dikfingroj) plej supren kaj poste puŝu ilin malsupren plurajn fojojn. Faru tion kelkajn fojojn.

VII. Froto de la spino. Premu per viaj du manoj la spinon kaj forte puŝu la montran, mezan kaj ringan fingrojn maksimume supren. Puŝu ilin malsupren ĝis la kokso.

Haltu momenton kaj daŭrigu la frotadon kelkajn fojojn.

VIII. Froto de la subventro. Frotu vian subventron per viaj dekstra kaj maldekstra manoj alterne plurajn fojojn. Tio estas utila al facila cirkulado de la vitala energio en la korpo kaj plezurigo.

El la Ora Ĵurnalo eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.